

Laborista Esperantisto

16DE JAARGANG No. 5 – 1 MEI 1947
VERSCHIJNT MAANDELIJKS
ABONNEMENT *f* 2.25 PER JAAR. LOSSE NUMMERS *f* 0.20. VOOR LEDEN GRATIS

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam (Oost).
Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Roelantstr. 4, A'dam-W.
Postgiro Amsterdam 331133..

ORGAAN VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN F.L.E.

IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

De SCHOOL en ESPERANTO

door P. Korte,
Hoofd ener Openbare School voor V.G.L.O.

De goden van de Radiolympus hebben een vraag te beoordelen gekregen, omtrent de wenselijkheid van onderwijs in Esperanto op de school. De redacteur van L.E. heeft daar al het zijne van gezegd. Thans wil ik gaarne iets zeggen over mijn ervaringen met het onderwijs in Esperanto op de scholen. Ik ben werkzaam aan een school voor V.G.L.O. te Veendam, en zal daaròm dit schooltype alleen maar bespreken.

Het V.G.L.O. (Voortgezet Gewoon Lager Onderwijs), meestal nog aangeduid met 7e en 8e leerjaar, betrekt de leerlingen voornamelijk uit de arbeidersgezinnen. Het zijn die kinderen, die zoals men zegt „niet verder leren", hoogstens nog naar een nijverheidsschool gaan. Als men in aanmerking neemt dat het 7e en 8e leerjaar dus eindonderwijs geeft en dat meer dan de helft van alle leerlingen, die een lagere school bezoeken, het hiermee voor hun verder leven moeten doen, zal men moeten toegeven, dat het van het grootste belang is, van dit onderwijs te maken wat er maar enigszins van gemaakt kan worden. Dat getracht moet worden de leerlingen nog zoveel mogelijk mee te geven aan, vooral, practische kennis.

In 't onderwijsprogramma voor deze scholen, komt m.i. aan het Esperanto een goede plaats toe. Vele collega's, niet-Esperantisten, moesten dit toegeven. Verschillende inspecteurs bij het lager onderwijs denken er eveneens zo over, getuige 't feit dat de inspectie aan enkele V.G.L.O.-scholen toestemming heeft gegeven het Esperanto in het leerplan op te nemen, gedurende 2 uur per week. D.w.z. les in de normale schooluren als verplicht leervak. Men doet met dit onderwijs daar dus ervaringen op, die meer zeggen dan kunstig in elkaar gezette theoretische beschouwingen. Meer dan de helft van de jongens en meisjes in ons land komen niet aan de drie moderne talen toe. Zelfs niet aan één! En zonder een vreemde taal missen ze practisch iedere mogelijkheid tot internationaal contact. Dit voorrecht, want inderdaad dat is het, is dus alleen weggelegd voor de bovenlaag. Intussen loopt daar de zaak ook lang niet zo gesmeerd als men dat wel wil doen voorkomen; men zie maar naar de vele internationale conferenties. „Dat komt natuurlijk, omdat men niet overal dezelfde vreemde taal grondig heeft geleerd", zeggen de wereldtaalvoorstanders, die dan heel simpel de oplossing willen zoeken in het verheffen van 't Engels tot tweede taal voor allen. Onder Esperantisten praten we hier niet meer over en vooral nu niet meer, nu ook zeer vele niet-Esperantisten tot het inzicht komen, dat die oplossing toch nog zó eenvoudig niet is: uit een politiek en taalkundig oogpunt, allebei. Trouwens, en nu kom ik tot onze leerlingen terug, een nationale, vreemde taal is voor onze scholen te moeilijk. Daar komt niets van terecht. En toch, tòch zullen ook die meer dan 50% „gewone" kinderen straks deel moeten hebben aan het internationale leven; zullen ook zij hun steentje moeten bijdragen tot het opbouwen van betere internationale verhoudingen. Ik zou willen zeggen: juist zij; juist de „gewone man". Van onderen op zullen wij iets moeten zien te bereiken. Met Esperanto — och neen, lezer, niet-esperantist, wij prijzen ons artikel niet aan als *hèt* wondermiddel, dat ineens alles ten goede zal doen keren, maar wel als één middel, dat heus waard is een plaatsje te zien ingeruimd. Met een atoomoorlog in 't verschiet is dunkt me elke hulp, hoe gering dan ook, slechts welkom. Met Esperanto dan zal ook de gewone man in staat zijn te constateren, dat een buitenlander eveneens maar een doodgewoon mens is, die dezelfde belangen heeft als hij. En hiermede is de eerste stap gezet op de weg naar internationale toenadering. En heeft die meer dan 50% ook recht op enige verruiming van de geestelijke horizon of leven we nog in de tijd, dat meer ontwikkeling alleen maar nodig is voor een groep bevoorrechten? Laten zij, die er prat op gaan „hun talen te kennen" eens bedenken wat ze zouden missen, als de school hun die kennis niet had bijgebracht. Is er dan niet alles voor om eens te kijken of de grote massa, die hier nooit aan toe komt, nog op een of andere manier hiervoor schadeloos kan worden gesteld?

En dat kàn! Inderdaad! En het gebeurt ook! Alleen nog niet in die mate, dat zij, die enige verantwoordelijkheid hebben voor de opvoeding van die grote massa, zich gerust kunnen voelen.

Die schadeloosstelling wordt niet gegeven in de vorm van een minderwaardig surrogaat, maar is een volwaardig product, dat in het gebruik bewezen heeft de mensheid grote diensten te kunnen bewijzen. Een reden, waarom het ook in intellectuele kringen steeds meer waardering vindt. Maar als dan de goden het eenvoudige stukje brood niet smaakt, is dit nog geen reden om het de gewone sterveling te onthouden. Och, brave bewoners van de Olympus, u moest eens zien hoe goed het smaakt. Voor de oorlog maakte ik een Esperantocongres mee: we gingen met de boot van Den Helder naar Texel. Een jonge veenarbeider uit Exloërmond zat op het dek te praten met Dr. Hugo Steiner, een hoog regeringsambtenaar uit Wenen, die toevallig in ons land was en het congres meemaakte. Ze praat-

ten samen honderd uit en naderhand vroeg ik de jonge man hoe het gegaan was, of hij zich verstaanbaar had kunnen maken en waarover zij het samen hadden gehad. „Mijnheer Steiner vroeg me naar mijn werk en hoe we daar leefden in de venen!" zei hij. En nu wilde ik, dat mijnheer de Wolff en de andere goden van de hoge Olympus het gezicht van deze jonge arbeider hadden gezien, toen hij er aan toevoegde: „En het ging heel goed. We konden elkaar heel goed begrijpen!"

Zal Esperanto gemeengoed worden van de grote groep jonge mensen, die geen moderne talen kunnen leren, als het onderwijs in deze „kunsttaal" aan het particulier initiatief wordt overgelaten? Och kom! Op de school moet het gebeuren, onder de gewone lesuren, in de vertrouwde schoolsfeer door de eigen onderwijzer. En het leerplan van de scholen voor V.G.L.O. wordt er heus niet door overladen. In die scholen is de behoefte er aan het grootst; laten we daar dan eerst eens een stevig begin maken. We kunnen onze jongens en meisjes, als ze de school verlaten, dan toch nog iets meegeven, iets:

waardoor ze minder ten achter staan bij hun vriendjes, die op de U.L.O. of H.B.S. hun onderwijs ontvangen;

waardoor ze, ouder geworden, ruimer zullen gaan denken;

waardoor ze hun vrije tijd op een aangename en ontwikkelende wijze kunnen vullen;

waardoor ook hun leven meer relief krijgt.

Toen onze inspecteur me naar mijn ervaringen over 't onderwijs in Esperanto aan onze leerlingen vroeg, heb ik geantwoord: „Ik wil het vak niet graag weer missen op mijn rooster!" En wel, omdat:

het de volle belangstelling van de leerlingen heeft, vooral als ze kunnen gaan corresponderen;

de correspondentie prachtige aanknopingspunten geeft voor een levende en levendige les in aardrijkskunde, geschiedenis of volkenkunde;

het van grote waarde is voor het onderricht in de Nederlandse taal;

het flink meehelpt om van een „groep" leerlingen een „klas" te maken;

het voor de leerlingen een grote practische waarde heeft voor het verdere leven.

De practijk heeft bewezen, dat het mogelijk is onze leerlingen in 2 jaar met 2 uur les per week, zover te brengen dat ze zich met het Esperanto zeer goed kunnen redden, dat ze dat zelf ook voelen en dus de durf hebben er mee door te gaan. Eén van onze leerlingen heeft als enige Nederlander 't vorige jaar deelgenomen aan een internationaal esperanto-jeugdkamp in Frankrijk. Hij kon zich er reeds behoorlijk redden na nog geen jaar les in Esperanto.

Als men al deze dingen meemaakt, dan dringt zich steeds weer bij mij de vraag op: Hoe komt het toch dat leidende figuren uit de arbeidersbeweging, met verantwoordelijkheid tegenover de opgroeiende jeugd nog zo vaak afwijzend staan tegenover het Esperanto?

En ik zeg het de redacteur van L.E. na: Laten deze dan toch eens éénmaal een congres bijwonen.

En, zou ik er bij willen voegen, praat eens met een heel gewone arbeidersjongen, die esperantist is. Kom eens van de Olympus naar beneden!

Uit Studentenkringen

Het is een gelukkig verschijnsel, dat men in de kringen der wetenschap wederom belangstelling voor Esperanto gaat tonen. Een verschijnsel, dat zich tijdens het leven van Dr. Zamenhof reeds ontwikkelde.

Uit de esperantopers van verschillende landen vernamen wij meermalen stemmen uit de studentenwereld om te komen tot een internationaal centrum en thans blijken er stappen in deze richting te worden gedaan. Dezer dagen nu verscheen de gedrukte uitgave van „Studenta Fronto", een naam die niet verklaard behoeft te worden. Het blad verschijnt in Bulgarije (adres: str. Car Sisman 11, Sofia) en tekent de activiteit der esperantisten op de Balkan. Dat geeft ons goede hoop voor de toekomst. Immers kwam de Esperantobeweging op de Balkan tot bloei in de jaren voor de oorlog 1914—1918, om na een herleving tot voor een twintigtal jaren, door dictatoriale maatregelen en verdachtmakingen, gelukkig slechts schijnbaar, ten dode te worden opgeschreven.

Doch de Esperanto-beweging was al internationaal en had overal vertakkingen. Waar ook de Esperantopropaganda werd belemmerd en de esperantisten vervolgd of verdacht gemaakt, in andere landen bleef de fakkel brandende. Was aan onze openlijke werkzaamheid op het vasteland van Europa en in Azië in de laatste oorlog een einde gemaakt, de Engelsen, Zuid- en Noord-Amerika en de enkele landen welke niet rechtstreeks onder het nazibewind leden, bleven actief. En dus hebben ook de sterk gedunde gelederen der Balkanesperantisten, bevrijd van het regiem, waaronder het Esperanto niet kon gedijen, hun taak weer opgevat.

De Kroatische en Bulgaarse studenten richten zich in hun orgaan tot de studenten van alle landen met een verklaring, dat Esperanto een belangrijk hulpmiddel is voor het onderhouden van relaties der studenten van de gehele wereld en bevelen de studenten-verenigingen aan, het Esperanto te gaan leren en het zich ten nutte te maken in hun internationale betrekkingen. Voorts om Esperanto in te voeren als een der officiële talen in internationale congressen, bijeenkomsten, in hun organen, rapporten en correspondentie.

Overigens bevat het blad wetenswaardigs over de bevolking der universiteiten etc. en lezen we, dat de Esperanto-studentengroep bij de Agronomische faculteit te Sofia 60 leden telt en twee cursussen, de Politechnische faculteit in Sofia heeft 30 Esperanto-leden; zij en de cursisten zoeken correspondenten in het buitenland.

EN LA URBDOMO DE HEERLEN.

Sabaton la 5an de aprilo tagmeze je la 3a kolektiĝis gekongresanoj sur la placo antaŭ Heerlena stacidomo. Multaj el ni devis veni de grandaj distancoj al ĉi tiu plej suda parto de nia lando. La autobuŝo, per kiu la ĉefestraro alvenus, bedaŭrinde malfruiĝis. Ni do ekmarŝis, akompanitaj de Heerlena muziksocieto, kiu aŭdigis belan muzikon.

Laŭlonge la dometoj de la ministoj, kie ĉiu enloĝanto staris antaŭ la pordo, ni atingis la pli viglajn ĉefstratojn, kie la promenantoj restis starantaj sur la rando de la trotuaro por nin vidi preterpasi.

Iom post la 4a horo ni envenis la Urbdomon, belan kaj tre modernan konstruaĵon. En la grandega halo troviĝis belega kaj tre larĝa ŝtuparo, sur kiu la gekongresanoj eksidis.

Post kelkaj momentoj eniris la anstataŭanta Urbestro kaj Heerlena Skabeno. La Urbestro oficiale bonvenigis la kongreson en Heerleno, plene substrekis la gravecon de internacia helplingvo; li bedaŭris, ke li persone ne scipovas nian komunan lingvon, sed sciigis kiel surprizon, ke la Skabeno pri Publikaj Laboroj feliĉe povis anstataŭi lin en tio. Efektive la Skabeno esperantlingve bonvenigis nian kongreson, deziris al ni agrablan kaj fruktedonan kongreson en la minregiono kaj aldonis, ke li, kvankam li ne plu uzis Esperanton dum multaj jaroj, ĝojas, ke li nun almenaŭ povas kapti la okazon. El la ĉefestraro feliĉe ĉeestis k-do Koeman, kiu nome de nia Asocio do povis respondi anstataŭ k-do Faulhaber.

Parolinto unue direktis sin al la Urbestraro de Heerleno por danki pro la oficiala akcepto; due li memorigis la altan takson de la tutlanda Esperantistaro, precipe el la pli nordaj regionoj, pro la ofero de la ministoj de siaj dimanĉoj en la karbobatalo dum la jus pasinta vintro.

Esperantlingve li respondis al la Skabeno, ke li certe parolas el la nomo de la tuta kongreso, esti agrable trafita pro la esp. lingva akcepto. Koeman esperis, ke iu el la Urbestraro trovos tempon dum kelkaj horoj ĉeesti nian kongreson, por ke oni konstatu la grandan signifon de Esperanto por internaciaj konferencoj. Ĉar Skabeno el la Urbestraro jam scipovas Esperanton, li esperis ke estonte la ankoraŭ malfortaj sekcioj Heerlen kaj Heerlerheide de nia Asocio povu kalkuli je la kunlaboro de la Urbestraro en la Propagando por nia idealo. La Urbestro, same kiel la Skabeno, promesis tion.

Post ankoraŭ kvaronhora diskuto inter la Urbestraro kaj diversaj Esperantistoj, la gekongresanoj forlasis la Urbdomon.

RAPORTO *pri nia 28a kongreso dum Pasko 1947 en Heerlen*

Unua kunsido.

Ĉeestas: 105 Delegitoj, 268 Membroj, 30 Gastoj.

Je la 14.45 horo K-do Sterken, la prezidanto de la OKK bonvenigas la ĉeestantojn kaj enmanigas la martelon al k-do F. Faulhaber, honora prezidanto, kiu malfermis la kongreson per jena parolado:

Malferma Parolado.

En la nomo de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo, mi kore salutas vin en ĉi tiu, nia 28a Kongreso.

Aparte mi bonvenigas la reprezentantojn de niaj novaj sekcioj, kaj niajn eksterlandajn gastojn:

K-dinon Glodeau por S.A.T.-amikaro en Francio; k-dinon Rolineau de Laborista Esp. grupo Parizo; k-don Burnelle el Belgio.

Plie la reprezentantojn de: Nederlands Verbond van Vakverenigingen (N.V.V.); Nederlandse Grafische Bond; Alg. Nederlandse Mijnwerkersbond; Advies-Bureau Stadsplan Rotterdam; Internacia Cseh Instituto; Bellamy-Movado; Arbeiders-Pers.

Al la Organiza Kongresa Komitato kaj la sekcioj de la Distrikto Limburgo mi esprimas nian dankon, pro la kora akcepto en ilia regiono kaj la multaj zorgoj en la preparaj laboroj.

Ni bone konscias, ke tiuj laboroj ne estis facilaj. Vi, organizantoj, loĝas dise en ĉi tiu parto de nia lando, malproksime unuj de aliaj, en diversaj vilaĝoj kaj same dise vi devis ankaŭ loĝigi nin. Ke vi tamen sukcesis, ni dankas al via obstina fervoro kaj idealismo.

Hodiaŭ ni kongresas en unu el la plej laboristaj regionoj de Nederlando, vera industria centro, kie regas la karbo, la fumo kaj la fulgo.

Kvankam jam pro tio ni, laboristoj; prave kunvenas tie ĉi, ni havas ankaŭ alian kialon por nia ĉeesto: en ĉi tiu regiono plej multe sentiĝas la bezono pri tutmonda lingvo, ĉar ĝi estas regiono *internacia*: niaj kamaradoj en la ĉi tieaj minejoj devenas el diversaj landoj de Eŭropo kaj ĉiutage ili dolore sentas la lingvodiversecon. Tial mi esperas, ke nia kongreso, kiu havas antaŭ ĉio propagandan karakteron, per sia praktika ekzemplo grave subtenos vian propagandan laboron en ĉi tiu medio.

Karaj gekamaradoj!

La trian fojon post la milito ni kunvenas kongrese. En la tempo pasinta, post kiam la katenoj de la nazismo estis rompitaj, ni klopodis per ĉiuj fortoj rekonstrui nian organizon. Sub gvidado de nia prezidanto, k-do Veen, ni komencis tiun laboron, kiun li preparis dum la okupado. (La Kongreso leviĝas de siaj seĝoj kaj k-do Faulhaber daŭrigas:) Bedaŭrinde li ne longe povis observi niajn progresojn: Kelkajn semajnojn antaŭ nia kongreso en Alkmaar malsano katenis lin sur la lito kaj unuan fojon en sia esperantista vivo li ne povis ĉeesti nian kongreson. Komence ni certigis al ni, ke k-do Veen post nelonge resaniĝos kaj reprenos la gvidadon de la organizo, kiu estis iom kara al li. Vane ni esperis. Lia sanstato pli kaj pli malboniĝis. Fine ni komprenis, ke li jam ne leviĝos de sia lito. Sed kvankam atendita, tamen la sciigo pri lia morto venis surprize.

K-do Veen vivis por Esperanto kaj por nia organizo, kaj lia familio partoprenis liajn zorgojn pri la bonfarto de la asocio. Kiom li signifis por ni, ni spertis grandparte poste, kiam ni sentis lian foreston pro la bezono de gvidanto, kiu povas okupi sin ekskluzive pri la asocio. Kun la prezindinto, Veen, ni perdis bonan kamaradon.

Same gravan sortobaton kiel la asocio, ricevis kelkaj sekcioj, kiuj pro la morto perdis fidelajn kaj aktivajn membrojn. Inter la antaŭa kaj la nuna kongresoj mortis:

K-doj de Geest, Schram, Högers, Zweistra, v. de Lugt, v. d. Plas, la k-dinoj Vrees-Pieters kaj Broekhuizen.

Sur tereno internacia ni funebras la morton de k-do Lanti, la fondinto kaj dum multaj jaroj la gvidanto de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Por tio, kion ĉi tiuj gekamaradoj faris por Esperanto kaj por nia movado, ni esprimu nian profundan dankon imitante ilian ekzemplon de fervoro kaj fideleco.

Ĉi kaze ni ne povas ne memori ankaŭ la viktimojn de la granda min-katastrofo, antaŭ ne longe okazinta en ĉi tiu regiono, kaj ĉe kiu kamaradoj perdis la vivon.

(Dume la kurteno malantaŭ la estraro leviĝis kaj minista fioreto kantis „Al la batalantoj" post kiam ĉiuj sidiĝis.) La Prez. daŭrigas:

La jaro pasinta estis por nia Asocio jaro malfacila, malfacila ne nur pro la morala kaj materia situacioj en la mondo, kiuj malhelpis al ni progresi tiom multe, kiom ni deziris kaj atendis.

Pioniroj por humaneca idealo.

Ni, esperantistoj, estas pioniroj por humaneca idealo, pioniroj, kiuj neniam laciĝas komenci denove, post kiam mallumaj potencoj en la mondo detruis la kulturon kaj ĵetis la homaron en abismon de malespero.

Tian epokon nia movado spertis duan fojon. Duan fojon la ŝtormo de milito furiozis super nia idealo kaj nia movado, kaj duan fojon ni spertas la moralajn sekvojn de la hombuĉada epidemio. Indiferenteco pri ĉio, kio ne estas materia, cinikeco, egoismo kaj ĝuemo, malfido pri la estonteco, kiu eble kaŝas en si novan militon — niaj patroj kaj prapatroj dirus al vi, ke tiuj fenomenoj aperas post ĉiu milito. Tamen la homaro ĉiufoje releviĝis kaj la pioniroj de la humaneco daŭrigis sian laboron, komence eĉ sub la plej malfacilaj cirkonstancoj. Ankaŭ *nia* organizo tiel rekomencis sian agadon. Kaj ĝi renkontas sur sia vojo la samajn obstaklojn, kiujn ĉiu milito metas tien. Ne ekzistas apartaj kaŭzoj por esti pesimista, ne ekzistas motivoj por timi, ke ni ne povas reatingi nian antaŭan staton kaj eĉ superi ĝin. Inter ni estas kelkaj anoj, kiuj iam travivis tian epokon en nia organizo, nome post la fino de la *unua* mondmilito. Ili diros al vi, ke la diferenco inter tiu tempo kaj la nuna, koncerne la spiritan staton de la homoj, ne estas tre granda. Ankaŭ *tiam* ni devis tralukti penigan periodon, en kiu ni kalkulis la ĉiujaran kreskon ne per *centoj* da novaj anoj, sed eĉ ne per *dekoj*. Tiutempe regis en la estraraj kunvenoj granda ĝojo pro ĉiu unuopa aliĝo, kaj ĉagreno pro ĉiu unuopa eksiĝo. Tiam la federacia estraro jubilis, kiam aliĝis kelkaj samtempe, kaj timis la pereon de la organizo, kiam kelkaj samptempe forlasis ĝin. La membronombro estis facile vundebla en tiu tempo. Regis la kutimaj postmilitaj fenomenoj malfacile trarompeblaj.

Kiam tre, tre malrapide revenis la fido pri la vivo, revenis ankaŭ la inklino al aferoj spiritaj, la kredo pri idealoj. Kaj kiam nia organizo estis malkreskinta ĝis 5 sekcioj kun entute nur 75 anoj, kiam por pesimisto ekzistus motivo por malesperi, — tiam kolektiĝis la kelkaj fideluloj kaj sub la devizo „sukcesi aŭ perei" ili streĉis siajn fortojn metante siajn ŝultrojn sub la federacio kaj — baldaŭ helpataj de pli kaj pli da novaj anoj — levis ĝin en proksimume 10 jaroj ĝis 5000 membroj, 160 sekcioj kaj propraj libro-servo kaj eldonejo, kiu krom diversajn instruilojn, eldonis ankaŭ multajn literaturajn verkojn, kiuj povas toleri komparon kun ĉio alia, kio sur ĉi tiu kampo en-kaj eksterlande aperis.

Estinte dum 18 jaroj la plej malgranda Esperanto-organizo, ofte suferinte humiliĝon pro tio, ke ĝi estas nur laborista, ĝi fariĝis la plej granda eĉ en la tuta mondo kaj ekzemplo por ĉiu alia organizo esperanta. Dume Esperanto disvastiĝis tiom, kiom neniam antaŭe kaj kiom en neniu alia lando. Tio daŭris, ĝis kiam la milito tuŝis ankaŭ nian organizon. Niaj vicoj maldensiĝis, sed ankoraŭ ni restis la potenca organizo ĝis kiam la malamiko en 1941a ĝin likvidis.

Post la ĵus pasinta milito komenciĝis simila epoko, kia post la antaŭa kaj same kiel tiam ĝi malfavore influas nian laboron. Eĉ pli grave ĝi influas, ĉar ĉi foje Nederlando mem suferis la militon, eĉ aperis el ĝi kiel almozulo. Granda estas ĝia materia mizero; zorgoj pri la nuda ekzistado premas nin eĉ nun, du jarojn post la liberigo: la dummilitaj promesoj de nia registaro ne plenumiĝis. Venis seniluziiĝo, kaj la estontecon kovras densaj nebuloj. Oni ne vidas antaŭ si esperigan perspektivon. Granda estas ankaŭ la mizero spirita: La moralo malaltiĝis, la egoismo pliakriĝis, regas suspektemo kaj malfido, oni vivas ekskluzive por siaj materiaj interesoj, kaj volas ĝui ĉion, kio estas ankoraŭ ĝuinda....

En tiu sfero, heredaĵo de la mondmilito, ni esperantistoj, devas labori por nia idealo. La pesimistoj povas ĉerpi sufiĉe da argumentoj por igi nin perdi la esperon. Tamen, kiom diferencas malgraŭ ĉio nia nuna rekomenco de tiu post la unua mondmilito! Kiam en majo 1945 ni reprenis nian laboron nia organizo estis la unua, kiu tuj restariĝis. De monato al monato kreskis la nombro da malnovaj fideluloj. Antaŭ ol pasis plena jaro, ni reakiris nian antaŭan pozicion en nia lando, eĉ en la tuta mondo kaj tiun pozicion ni ankoraŭ nun okupas. La fakto, ke ni sukcesis savi dum la okupado la posedaĵon de la Libro-Servo kompreneble grave influis tion, sed ankaŭ la fakto, ke niaj membroj restis neinflueblaj por la spiritaj malsanoj post-



Ter herinnering aan ons congres in de mijnstreek.

WERKER

De arbeid ligt ten voeten uit
In ied're trek verborgen,
Het nationale fenomeen
Van nationale zorgen.

ZIJN glimlach is de lach van 't land,
ZIJN houw brengt ons de kolen.
Een gloed van warme werkerstrots
Ligt in z'n blik verscholen.

A. W. van Kluyve.

militaj havas ne malpli grandan signifon.
Kaj kion ni dum la okupado ne kuraĝis esperi, tio tamen efektiviĝis: jam tri semajnojn post nia liberiĝo denove aperis nia organo „Laborista Esperantisto", kiu okazintaĵo haviĝis al ni kortuŝajn leterojn pri ĝojo de niaj anoj. „Ni do ne ĉesu esperi" daŭriĝis k-do Faulhaber sian, kun streĉa atento aŭskultitan paroladon, en kiu li skizis kion nia asocio sukcesis denove fari kaj entrepreni. Reaperis „La Progresanto", aperis broŝuroj kaj aliaj propagandiloj: je la dua fojo post la liberiĝo ni sukcesis eldoni 4000 ekzemplerojn de lernolibro. Tamen la propagando ne estis fruktodona, krome la severa vintro malfavore influis la kursojn kaj la rezultatojn. La papermanko grave malhelpas la eldonon de literaturaj verkoj per kiuj nia Libro-servo povas provizi nian asocion per la ege bezonata mono.
La prez. tuŝis plue la problemon pri solvo de lingvaj malfacilaĵoj en internaciaj konferencoj, la propagandon por „Basic English" dum elstaras Esperanto kun sia 60-jara praktiko uzata de homoj, intelektaj aŭ simple instruitaj, kaj jam ne lasas sin forpuŝi. La postulo „Esperanto en la lernejojn" necesigas koncentrigon de la fortoj de ĉiuj esperantistoj, nacie kaj internacie. Necesas komitato sur internacia tereno, simila al nia Nederlanda Centra Komitato, konsistanta el la kvar Nederlandaj Esp. organizoj, kiu jam alportis bonajn fruktojn.
Post la mencio, ke ekfunkciis pas. jare kvar novaj fakoj en nia Asocio, nome la *Junularkomitato*, la *Komitato Esp. ĉe la Junularo*, la *Instrua Servo* kaj la institucio *F.L.E. Amikaro*, kies farojn kaj sekvojn ni esperplene sekvas, k-do Faulhaber finis sian malferman paroladon per la jenaj vortoj:

Gekamaradoj,
Mi faris ĉi tiun malgrandan bilancon pri nia asocio, pri ĝiaj ebloj kaj malebloj, por ke vi komprenu en kiu situacio ni ĉi momente vivas. Tiun situacion mi opinias tia, ke, kvankam ne facila, ĝi tamen ne motivigas pesimismon. Post la unua mondmilito ni devis tralukti multe pli malfacilan tempon, kiam ni nombris apenaŭ ducent membrojn kaj ne posedis la organizajn aparatojn, kiujn ni posedas nuntempe.
Nun ni estas preskaŭ trimilope, kaj vi certe konsentas kun mi, ke kun tiom da anoj ni povas fronti la malfacilaĵojn de la nuna epoko; se ni ĉiuj metos niajn ŝultrojn sub la laboro, ni povos levi nian movadon ĝis konsiderinda alteco.
Certe, en ĉi tiu mondo, kiu ankoraŭ ne trankviliĝis post la lasta milito, la sukcesoj ne venos sen nia granda penado. Sed konsiderante, ke ni iam venkis similan situacion, kaj ke ni venke transvivis kvin jarojn da germana okupado kun ĉiuj zorgoj kaj mizeroj ligitaj kun ĝi, ni rajtas esperi, ke ni ankaŭ venkos la nunan krizan tempon.
Lumigas ĉi tiun punkton la konsiderinda kresko de S.A.T. en nia regiono post la milito. Tio signifas, ke oni pli kaj pli komprenas la valoron de la posedo de Esperanto por la praktikaj celoj de nia klaso, ke oni konsideras sian devon kontribui al tutmonda interkompreniĝo.
Hieraŭ mi aŭdis iun kamaradon diranta al alia: „Por mi Esperanto estas scienco". La alia respondis: „Por mi ĝi estas idealo". Mi inklinas samopinii kiel la lasta. Mi ĝojas kun la unua, ke Esperanto en la daŭro de la jaroj montriĝis instrumento same delikata kiel lingvo nacia kaj ke oni efektive povas paroli pri *scienco*. Sed kiom ajn profunde oni studas la lingvon kaj trovas en tio sian plezuron, oni ne forgesu, ke ĝi ne estas pacienc-ludeto, kiun oni ludas sola hejme, sed ke ĝi estas *ilo*, kiun ni devas uzi en la plena vivo. Ni uzu ĝin por la emancipado de la homaro ĝenerale kaj de nia klaso precipe, emancipado en tutmonda spirito.
La laboristaj gvidantoj staras ankoraŭ flanke de nia afero. Ili prefere baraktas kontraŭ la multlingveco per la antikvaj nekontentigaj manieroj, ol akcepti la plenvaloran solvon, kiun Esperanto prezentas al ili. En ĉi tiu kongreso ni denove nin turnos al ili kaj ni ne ĉesos fari tion, ĝis ni estos atingintaj nian celon.

Gekamaradoj,
En ĉi tiu malfermo mi ne ŝvebis alte en la nuboj de nia idealo, sed restis kun ambaŭ piedoj firme sur la tero.
Por ke nia idealo venku, estas antaŭ ĉio necese, ke ni restu kune, ke ni plifortigu nin interne, ke ni vidu ne nur la malfacilaĵojn, sed ankaŭ la kuraĝigajn simptomojn.
Ĉi tiu, kongreso do donu al ni freŝajn fortojn, klaran spiriton kaj la esperon, kiujn ni bezonas en la sekvonta kaj en eble postsekvontaj jaroj. Tiam ni povu rigardi ĉi tiun kongreson kiel preparon por la granda rikolto, kiu ne povas ne veni.
Kun tiu deziro mi malfermas la kongreson!



Salutparoloj.
K-dino Glodeau el Parizo salutas la kongreson en la nomo de la P.K. de S.A.T. K-do Piron en la kongreso en Alkmaar, anoncis la 400an membron de S.A.T. en Francio. Nun ŝi povas sciigi, ke tie S.A.T. jam havas 800 membrojn. K-do Bournel el Bruselo, salutis la kongreson en la nomo de la Belga S.A.T.-amikaro. Reprezentantoj de N.V.V., Mijnwerkersbond, Alg. Ned. Grafische Bond, Cseh-instituto kaj la Bellamy movado ankaŭ alparolis la kongreson. La reprezentanto de Adviesbureau Stadsplan Rotterdam transdonas al la estraro kvanton da libretoj en Esperanto, oficiale eldonitaj de ĉi tiu institucio pri la rekonstruo de Roterdamo.

Saluleteroj.
Envenis multe da salutleteroj kaj telegramoj el kiuj ni mencias tiujn de:
Ministro Drees; Sveda LEA, (kun donaco de 4 flagoj por la konkurso de FLE-amikaro); Dana LEA; SATEB; Hungara Esp. Societo Lab.; Pola lab. Asocio; IEL; Fl.LE; Sveda Esp. Fed.; UEF; SES; Francaj Esp. Instruistoj; LEEN; Esperanto ĉe la Instruado; Ned. Katoliko; Esp. Akademio; FERN; VARA; KUNE; NOV; EVC; AJC; Ned. Bond Tuinb. en Zuivelbedr.; ANDB; Ned. Trekkersbd; Hum. Verbond; Wij Vrouwen; Julia Supichova; K-dino Faulhaber; k-doj Brown; J. L. Bruijn; J. Lem; Konsilanto Willekens; Teo Jung; Koos Vorrink, prez. de la soc. Labor-Partio en Nederlando; van Staveren; k-doj Labordus; Rosenbloom; J. Pelcman; De Dageraad; Aŭstria Esp. Federacio; TJO; Heroldo de Esp., Kroatia Esp. Ligo; I.v.A.O.; EVC afd. Metaal Nijverheid; U.E.A.; Pola Esp. Asocio.

Ĉeestlisto.
En la kongreso ne estas reprezentataj la jenaj sekcioj: Aalsmeer, Andijk, Almelo, Antwerpen 1 kaj 2, Apeldoorn, Assendelft, Asd 12, Breezand, Gorkum, Den Helder, Krimpen, Heerlerheide, Kerkrade, Vlissingen, Lochem, Deurne kaj Merksem.

Elekto Voĉdonkomisiono.
Oni elektas la kamaradojn Burggraaf, Altena, kaj Roskam.

RAPORTOJ.
La kongreso, kiun k-do Faulhaber prezidas, komencas pritrakti la raportojn.

a. Sekretaria Raporto.
Rotterdam 5 rimarkigas ke laboristoj ne facile povas liberigi sin je sabato, por partopreni ekzamenon. Ni denove okazigu ekzamenon ankaŭ je dimanĉo.
Plie la delegito plendas, ke la asocia estraro rifuzis kongresproponojn. Nur la kongreso decidu pri akcepto aŭ malakcepto. En la lasta momento ĝi mem aldonis al la tagordo proponon tute novan, kiu celas provizore nuligi paragrafon 3an de la Gõtenburga konvencio. Pro tio li prezentas ordoproponon ĉe la koncernata punkto.
Heiloo samopinias.
Hago aprobas la raporton kaj dankas la estraron pro ĝia bonega laboro. La del. bedaŭras, ke oni ne prezentis proponojn pri Esp. ĉe la P. v. d. A. (Soc. Labor-Partio). Li petas pli da aktiveco en tiuj aferoj.
La Konsilantaro liaopinie devas kunveni pli ofte ol nur unu fojon en jaro.
K-do Kruit konsentas, ke la manko de ekzamenoj je dimanĉo signifas efektivan ĝenon. En la komitato ni energie defendis nian vidpunkton, sed fine devis cedi pro la rigora rifuzo de la kristana organizo okupi lokon en la komitato, se ĝi ekzamenus je dimanĉo.
Pro financaj kialoj ne eblas kunveni pli ol unu fojon en jaro kun la konsilantaro.
K-do Alings respondas, ke la anoj mem devas propagandi Esperanton en la P.v.d.A. Pri la malakcepto de proponoj fare de la estraro, li rimarkigas ke la antaŭa kongreso dediĉis multe da tempo al la statuto. Jam nun denove trakti ŝanĝojn li forte malrekomendas, ĉar tiel niaj kongresoj fariĝus tedaj. Cetere tiaj proponoj malutilus al la prestiĝo de nia organizo.
K-do van Haren respondas al la Haga delegito, ke la P.v.d.A. rilatas tre pasive al Esperanto. Okaze de ĝia kongreso li ensendis amendon por subteni enkondukon de Esperanto ĉe mezgrada instruado.
K-do Faulhaber ankoraŭ atentigas pri la ekzamenoj je sabato, ke la ekzamena komitato ricevis neniun plendon. Ĉe manko de pruvoj pri malkontenteco malfacile oni povas konvinki la kontraŭulojn pri la neceso ekzameni ankaŭ dimanĉe.
La kongreso aprobas la sekretarian raporton.

b. Financa Raporto.
K-do Pouli, la kasisto, donas kelke da klarigoj.
Sub elspezoj por k-do Veen estas enkalkulita la sumo por aĉeti propran tombon. En la skribaj elementa, A- kaj B-kursoj de la Instrua Servo partoprenas respektive 120, 30 kaj 40 kursanoj. Pri la financaj rezultatoj oni povas nur juĝi post finiĝo de la kurso. La noto pri deficito sub elspezoj apartenas al la bilanco.
K-do Spaarenberg por la kaskontrola komisiono informas la kongreson, ke la komisiono ankoraŭ ne povis fini la kontrolon kaŭze de tro malfrua invito. Kun k-do Kamstra li dufoje kunvenis ĉe k-do Pouli. K-do de Bruijn ne povis ĉeesti. La komisiono opinias, ke la sumo (donacoj) devas troviĝi inter la enspezoj. La kontribuo de la FLE-amikaro estu rezervata por servoj al la amikaro mem.
Rotterdam 2 esprimas dubon pri la ĝusteco de la taksita valoro de la asociaj posedaĵoj.
Nieuwe Niedorp opinias ke la buĝetita elspezo por librokontrolisto ŝajnas al li tro alta.
Heiloo plendas pri la tro altaj kostoj de la konsilantaraj kunvenoj.
Arnhem nomas la kasraporton malklara tial ke ĝi miksas en- kaj elspezoj sur ambaŭ flankoj. Krom tio ĝi aperis malfrue. Nur la deficito liaopinie jam necesigas la plialtigon de la kotizo.
K-do Pouli defendas sian raporton rimarkigante, ke diversaj havoj perdas valoron pro uzado. Ekz. adresplatetoj, se ili estas surpresitaj, senvaloriĝas el financa vidpunkto. La aparato li taksis je 250 guld. kaj saman valoron por la 5 skribmaŝinoj, ĉar riparo de 1 skribmaŝino postulis pli ol 100 guld.
250 guld. por librokontrolisto estas vere malalta sumo.
La konsilantaro-kunveno efektive kostas nuntempe multe da mono, sed tio ne estas ŝanĝebla; la konsilantoj devas ankaŭ manĝi. Fine

li esperas, ke li sekvontjare pli frue povas aperigi la financan raporton.

Groningen 1 informiĝis pri la ŝuldo al Dico.

K-do Pouli respondas, ke li ĉiam pagas laŭpove, sed el la L.S. li ne rajtas ĉerpi pli ol la buĝetita sumo.

Post rimarko de Alings, ke la ŝuldo parte rezultanta el malfruiĝo de fakturoj, montras la gravecon de nia organizo kaj ĝian disponon je fido, *la kongreso unuanime akceptas ankaŭ la financan raporton.*

Fermo de la unua kunsido.

Dua kunsido.

Malfermo je la 19.40 h.

Estas pritraktata la

RAPORTO LIBRO-SERVO.

Rotterdam 5 prezentis ordoproponon ne trakti en la nuna kongreso la proponon de la asocia estraro pri provizora nuligo de paragrafo 3a de la konvencio kun S.A.T.

K-do Faulhaber forte malkonsilas akcepti la ordoproponon, ĉar konservo de la 3a paragrafo signifas rifuzi al la asocio la eblojn por fruktodona laboro. Montriĝas, ke la delegito de Rtd 5 ankoraŭ ne ĉeestas.

La kongreso unuanime malakceptis la ordoproponon.

K-do Faulhaber citas la tekston de paragrafo 3a kaj priskribas la intertraktojn kun S.A.T. en la pasinta jaro por akiri ĝian konsenton pri provizora nuligo. La estraro argumentis, ke la situacio post la milito tute ŝanĝiĝis. Por venigi librojn el eksterlando oni nun devas pagi per propraj libroj. Kaj, ĉar la sorto de nia asocio dependas de ĝia financa kapablo, oni devas havigi al la L.S., nia ĉefa fonto de enspezo, la rajton mem eldoni Esperanto-verkojn. S.A.T. rifuzis akcepti tion. Anstataŭe ĝi promesis provizi la L.S. per nova stoko el mendoj ĉe C.E.L. Ĉi tiun promeson S.A.T. ne povis plenumi kaj tial ni interkonsente kun la konsilantaro, fine ne sciis alian solvon ol proponi la provizoran malfunkciigon de la koncerna paragrafo. Antaŭ ol elmeti la proponon al diskutado, k-do Faulhaber emfaze rekomendas al la kongreso akcepti ĝin.

K-do Wels opinias sian taskon, juĝi pri ĉi tiu grava afero, tre malfacila. Li laboras por ambaŭ organizoj kaj konscias, ke harmonia kunlaboro estas nepre necesa. Akcepto de la propono certe kaŭzos malagrablaĵojn kun S.A.T. Ke la paragrafo rezervas la rajton eldoni Esperanto-literaturon al nur unu organizo, estas liaopinie netaŭga aranĝo, ĉar, kio rezultas se ĉi tiu organizo estas malaktiva? Ĉe libera eldonrajto estiĝos konkurenco, sed konkurenco ne ĉiam estas malbona. Bedaŭrinde la asocia estraro nur lastmomente prezentis sian proponon. Ne informita antaŭe, la anaro nun malfacile povas decidi. Ĉu ne eblas prokrasti la aferon kaj dume denove interrilati kun S.A.T. por ankoraŭ klopodi pri kompromiso, eventuale pere de la LEA-komitato?

Laren—Blaricum nomas la proponon sensencaĵo, ĉar por ŝanĝi la konvencion necesas interkonsento kun S.A.T. Kaj strange, ke oni nur tuj antaŭ la kongreso prezentis ĝin, kvankam la antaŭa kongreso jam traktis ĉi tiun aferon. Al rimarkigo el la salono, ke lia vidpunkto estas privata opinio la delegito konsentas.

Arnhem atentigas, ke nuligo de paragrafo 3a aŭtomate faligos ankaŭ la 5an paragrafon.

Amsterdam 5 demandas, ĉu la estraro rajtas enŝovi proponon kaj cetere substrekas la opinion de k-do Wels.

Hago favoras la akcepton de la propono kondiĉe, ke la kongreso plej laste en 1950 denove traktu la aferon, kaj ke la estraro dume rilatu kun S.A.T. por trovi solvon.

K-do Kroonder kiel konsilanto de la L. S. komitato defendas la proponon, skizante la motivojn, kiuj gvidis la proponintojn. Li ne kredas, ke ĝia akcepto malfavore influos niajn interrilatojn kun S.A.T.

Rotterdam 5 antaŭvidas gravajn malfacilaĵojn kun S.A.T. La nuligo de la paragrafo signifos, ke nia asocio ekhavos monopolon pri eldonado de Esperanto-libroj. Li ne esprimas malfidon, sed oni komprenu, ke en eksterlando povas regi aliaj opinioj pri eldonrajto ol ĉi tie. Koncerne la financan flankon li rimarkigas, ke ne la L.S., sed la asocio mem malprosperas. Kaj la maniero, kiel la asocia estraro prezentis la proponon, estas tute kontraŭregulara. Li insiste petas eviti konfliktojn kaj trankville interkonsiliĝi kun S.A.T.

K-do Kruit respondas, ke pli frua prezento de la propono ne estis ebla pro la kompromiso de la pas. jaro, kies rezultatojn oni devis atendi. Fine montriĝis, ke S.A.T. ne povas havigi konsiderindan kvanton da libroj kaj tiam la estraro estis devigita serĉi alian solvon. „Nevenkebla Ĝeno" estas kompostata kaj devas esti ankaŭ eldonata. Ni intencas eldoni 3000 ekzemplerojn kaj sukcesis akiri la bezonatan kvanton da papero. Se ni nur povas liveri en Nederlando, sed devos cedi parton al S.A.T. je produktokosto, ni perdos parton de la pene akirita papero. La L.S. vendas nun el stoko kaj stoko ne estas eterna. Ni devas atenti, ke ni povu interŝanĝi kun eksterlando por prezenti al niaj membroj librojn el eksterlando.

Koncerne eldonadon de Esperanto-libroj en eksterlando li informas la kongreson, ke en Portugalio aperis Vivo de Zola kaj aliaj verketoj eldonitaj de S.A.T.-rondo. Ankaŭ Stela Klubo en Svedio en kiu SLEA partoprenas, En Danio aperis „Tra densa mallumo" eldonita de lab. grupo. Pro la konvencio ni ne mem povas eldoni kaj pro tio ni deziras provizore likvidi la 3an paragrafon. Ni klopodis pri solvo, sed S.A.T. ne povis plenumi sian promeson. Ne ni havos monopolon, pri eldonado de libroj, sed S.A.T. havas ĝin. Ni tute ne ĝenos S.A.T., kontraŭe ni ĝojos, se ĝi mem sukcesos eldoni librojn. Fine li diras, ke la afero verŝajne estos traktata en la LEA-komitato.

K-do Pouli donas kelke da ciferoj. Inter 1938 kaj 1940 ni ĉerpis el la L.S. 7800 guldenojn, tio estas 45 % de la neta profita saldo. Sen la L.S. ni ne povus aranĝi niajn kongresojn. Kun S.A.T. ni havis la kompromison, ke ĝi mendos librojn ĉe CEL, sed ni ricevis nur 90 Krestomatiojn.

K-do Alings faras la rimarkon, ke la tuta estraro apartenas al la aktivaj SAT-anoj. De ili oni ne povas atendi agojn malfavorajn al S.A.T. Se la asocio floras, ankaŭ S.A.T. floras.

K-do Wels konvinkiĝis, ke la motivoj de la estraro estas pravaj. Ni ne ŝatas ian ajn monopolon. S.A.T. ne kontentige laboris sur la tereno de la eldonado. Oni devas atenti la ĝeneralajn interesojn. Ankaŭ la LEA-oj rajtu eldoni librojn. Eble S.A.T. fariĝos pli vigla pro tio.

Li konsilas al la kongreso akcepti la proponon kun amendo, ke la sekvontan jaron la kongreso denove traktu la aferon.

K-do Kruit: La sekvontan jaron ni povos, sed en 1950 ni devos trakti la aferon.

La kongreso akceptas la proponon de la estraro kun la amendo de Hago.

Raporto „Esperanto ĉe la junularo".

K-do Suurmans ankoraŭ klarigas sian raporton, aperintan en la febr. numero de L.E. Li aldonas ne esti plene kontenta pri la agado de Juko, ĉar laboro de Juko nun interkroĉiĝas kun tiu de la komitato.

K-do van Rijn diras, ke ne estas la celo de Juko interpuŝiĝi kun la komitato. Ĝi volas kunlabori kaj praktike propagandi Esperanton *inter* la gejunuloj mem.

K-do Kruit konstatas ke, la komitato funkcias. Ni kontinuigu ĝiajn laborojn kaj petas la oficialan sankcion de la kongreso. La kongreso konsentas.

ELEKTO ESTRARO.

K-do Faulhaber diras, ke pro la morto de k-do Veen necesas elekti novan prezidanton. La estraro proponas k-don van Haren prezidanto. La kongreso aplaŭde akceptas. Poste li proponas k-don P. van der Plank, kiu intertempe venis en la estraro por anstataŭi k-don de Vries, kies fakon li transprenis.

La aliaj estraranoj pretas kontinuigi siajn funkciojn kaj plie Amsterdam 6a prezentas k-don Korff por la vakanta loko.

Post kiam Hago estis direktinta kelke da laŭdaj vortoj al k-do Faulhaber, la kongreso akceptas la novan estrarformiĝon.

La Kongreso nun transiras al pritraktado de la

PROPONOJ.

Kotizo.

Proponoj asocia estraro distr. Gelderland, kun amendo de Rotterdam 4 kaj distr. N. Holland.

Amsterdam 1 estas konvinkita, ke kotizaltigo kondukos al malgrandiĝo de la membronombro. Li preferas serĉi aliajn rimedojn por akiri monon kaj i.a. mencias vendadon de kajeroj kaj lingvaj libretoj.

Zaandam esprimas sin komence kontraŭ kotizplialtigo. Ĝi proponas aperigi L.E. unufojon malpli en la somero por tiel ŝpari monon.

Amsterdam 5 pretas akcepti la estraran proponon sed opinias, ke uniforma kotizo ne estas ebla.

Amsterdam 9 deklaras sin kontraŭ la propono kaj per kelkaj ciferoj pruvas, ke lia sekcio troviĝos en malfacila financa situacio, se la kongreso akceptos la proponon.

Hago favoras la akcepton, sed intencas ne altigi la kotizon de siaj membroj.

Rotterdam 5 ĝojas, ke li kiel opoziciulo ne bezonas kontraŭstari la altigon de la kotizo. Ni tamen helpu iel la malfortajn sekciojn.

K-do Pouli instigas akcepti la proponon: ĝi validu de la unua de aprilo. Aldone li proponas, ke la urba kaj provinca distrikto mem decidu pri divido de la kotizo.

Post la vortoj de Pouli Gelderland kaj Noord Holland reprenas siajn proponojn.

Voĉdono.

Kontraŭ: Asd 11, Rrd 1, Asd 9, Deventer, Laren, Zeist, Maastricht, Zaandam, Asd 1, Heiloo, Alkmaar, Zuilen, Hoorn, Rtd 7, Rtd 6, Rtd 4, Wormer, Nieuwe Niedorp kaj Schiedam.

La propono do estas akceptita per 1851 por kaj 626 kontraŭ.

La asocia estraro transprenas la duan parton de la propono distrikto Gelderland kun la amendo de Rotterdam 4. *Neniu kontraŭ.*

Pri Organizaj demandoj.

Propono Rotterdam 3 (kongreskostoj).

Rotterdam 3 defendas sian proponon kaj ne povas konsenti pri la klarigo de la estraro, ke la propono estus tro malfavora por grandaj sekcioj.

Rotterdam 6 samopinias kun Rtd 3 kaj informas, ke por la propagando la roterdamaj sekcioj proporcie pagis la kostojn.

Zuilen ankaŭ favoras la proponon de Rtd 3, kaj konsilas al la sekcioj kunfandiĝon kiel en Hago por pli ekonomia mastrumado.

Hago diras, ke tio denove signifus plialtigon de la kongreskotizo.

Rotterdam 2 esprimas sin kontraŭ la plialtigo de la kongreskotizo.

Haarlem diras, ke la proponintoj maltrafis la ĝustan vagonaron. Ĝi jam foriris en la antaŭa kongreso, kiu traktis similan proponon kaj malakceptis ĝin.

K-do v. Essen klopodas rigardi la aferon kiel konsilanto. La malgrandaj sekcioj klopodu ne tiom envie rigardi la grandajn sekciojn, ĉar ankaŭ ili havas siajn zorgojn.

Rotterdam 5 kritikas la strukturon de Hago. Li nomas ĝin organiza monstraĵo. Formale tie ekzistas unu sekcio kun sub-sekcioj, do

laŭregulare ĝi nur bezonas pagi kiel unu sekcio.
Hago interrompas, ke ĝi pagas proporcie laŭ la membronombro de Amsterdam.

Voĉdono.
Por: Rtd 3, Zuilen, Laren, Delft, Leiden, Oostvoorne, Amersfoort, Utrecht, Hilversum, Rtd 6, Rtd 7, Wormer, Hengelo, Leeuwarden, Dordrecht, Heerlen, Maastricht, Asd 2, Asd 6, Willebroek.
Malakceptita per 1911 kontraŭ kaj 566 por.

Laborista Esperantisto.
Propono Enschede (pri junularrubriko).
Neniu kontraŭ kvankam k-do Bakker por Juko klarigas, ke ĝi ne plu bezonas lokon en L.E., ĉar ĝi mem eldonas bultenon.

Gazetaro.
Proponoj de Schagen, Schiedam kaj amendo de Enschede. (propagandgazeto)
Rtd 2 subtenas la proponojn.
K-do Alings informas, ke oni konsideris la eblon kaj konkludis, ke la propono estas efektivigebla, kondiĉe ke oni povu eldoni min. 5.000 aŭ 10.000 ekzemplerojn. La gazetoj povos esti kolportataj por 5 cendoj, dum la sekcioj bezonas pagi nur 4 cendojn.
Al la FLE-amikaro ni prezentu senpage la gazeton hejme, por ke restu kontakto.
La prez. klarigas kial N.C.K.E.-ne povas eldoni tian gazeton, ĉar ĝi devas havi propran karakteron.
Post tio la proponoj kun amendo estas akceptitaj.

Diversaĵoj.
Proponoj Schagen kaj Amersfoort.
K-do Koeman: Por profite povi vendi kalendaron, ni bezonas minimume 10.000 ekzemplerojn sed kiu garantias al ni la vendeblon de tiom granda kvanto?
La estraro dubas pri la utilo de adreslisto, ĉar jam post kelkaj monatoj ĝi senvaloriĝus pro la translokiĝemo de la nederlandanoj.
Fermo de la dua kunsido je la 22.50 horo.



La 3a kunsido komenciĝis per parolado de la novelektita prezidanto k-do A. F. van Haren. Post sia parolado k-do v. Haren prezentis ĉi subajn du Rezoluciojn nederlandlingvajn, kiuj jam en centoj da ekzempleroj, kun aldona letero, estas senditaj al ĉiuspecaj laboristaj organizoj, partioj kaj instancoj, al la Registraro, parlamentanoj k.c. La parolado, la raporto pri la 3a kunsido kaj la pritrakto de la IIIa rezolucio, sekvos en L.E. de Junio proks.

Rezolucioj

akceptitaj de la 28a Kongreso de Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. en la regiono de la nederlanda lingvo;

I. La Kongreso:
konvinkite, ke necesas kai dezirindas intima kunlaboro de la laborista movado por krei pli bonajn rilatojn inter la popoloj kaj por plenumi tiujn aranĝojn, kiuj posedas ĝeneralan intereson kaj koncernas la internacian terenon;
juĝante, ke tiurilate la laborista movado ĝenerale ne estas tre aktiva;
konstatas, ke rekta kontakto kun la organizoj el la plimulto de la Eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj estas malhelpata de la lingvodiverseco kaj ke ankaŭ tiuj, kiuj okupas gvidan funkcion disponas nur pri limigita, do ne sufiĉa lingvoscio;
opiniante, ke la apliko de Esperanto, kiel lingvo internacia, povos finigi tiun ĉi ĥaosan situacion;
bedaŭras forte, ke la laboristaj organizoj, anstataŭ plenumi pioniran laboron, kiu povus havi eksterordinaran gravecon por ilia agado sur internacia tereno kaj favorus la pacigan kontakton inter iliaj membroj individue kun personoj el ĉiuj mondopartoj, ĝis nun kondutis malakcepteme al la enkonduko de Esperanto kaj rifuzis subteni la propagandon por Esperanto;
instigas, sur bazo de propraj spertoj dum kelkaj jardekoj, nun fari la necesajn aranĝojn, por ke plej baldaŭ Esperanto okupu en la internaciaj rilatoj de la laborista movado la ĉefan lokon;
kaj petas plej eble baldaŭ nomi komisionon por doni sian avizon kaj jam nun plene subteni morale kaj finance la Asocion de Laboristaj Esperantistoj F.L.E.



II. La Kongreso:
konsiderante, ke la evoluo sur ekonomia, kultura kaj politika tereno necesigas al internaciaj kunlaboro kaj kunordigo;
opiniante, ke la lingvodiverseco formas gravan baron kontraŭ sana evoluo de la internaciaj rilatoj, kaj la uzo de naciaj lingvoj prezentas nenian solvon por la lingvoproblemo;
konsiderante, ke „Esperanto" kiel neŭtrala kaj internacia lingvo praktike plene pruvis siajn taŭgecon kaj uzeblecon, neniel tuŝas la naciajn prestiĝon kaj dignon kaj ke ĝia strukturo igas ĝin lernebla kaj aplikebla por ĉiuj nacioj;
konsiderante krome, ke kreskanta nombro da ŝtatoj kaj internaciaj korporacioj, komprenante la bezonon pri lingvo internacia kaj la uzeblecon de Esperanto por tiu ĉi funkcio, pretas apliki en siaj internaciaj rilatoj tiun ĉi lingvon;
urĝe rekomendas al la registaro kaj al ĉiuj koncernataj instancoj:
1e. konsideri la instruon de Esperanto en la instruistaj seminarioj kaj ebligi la instruon de Esperanto en la lastaj klasoj de la elementa lernejo;
2e. esplori la eblon de internacia konvencio pri la akcepto kaj uzo de Esperanto.

III. La Kongreso:
konsiderante, ke en pluraj landoj oficialaj kaj neoficialaj instancoj estas pretaj iel akcepti Esperanton, kondiĉe, ke ankaŭ en aliaj landoj oni reciproke enkonduku Esperanton;
opiniante, ke tial kunlaboro de ĉiuj esperanto-organizoj en ĉiuj landoj kaj de ĉiuj tendencoj estas nepre necesa;
deziras, ke stariĝu la Internacia Centra Komitato reprezentanta ĉiujn Esperanto-organizojn, kiu prizorgu la internacian kontakton kaj cetere projektu ĉion, kio estas efektiviginda sur komuna tereno;
prezentas ĉi tiun rezolucion al la ĉi-jaraj internaciaj esperanto-kongresoj kaj plie al la internaciaj kaj apartaj naciaj Esperanto-organizoj kaj alvokas al kunlaboro, por ke ankoraŭ en 1947a estu elektata provizora estraro aŭ komisiono por fiksi regularon kaj gvidliniojn.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

Einde 1946 telde de neutrale Engelse Esp. bond 3030 leden. Uit het verslag blijkt een intensieve activiteit. Uit het bedrag aan salarissen (£ 1348.14.3 = ruim f 14.000.—) dat deze bond betaalde in 1946 blijkt wel, dat men daar het werk met vrijwillige hulp niet af kan.

Resoluties

aangenomen door het 28e Congres van de Bond van Arbeiders Esperantisten F.L.E. in het gebied van de Ned. Taal;

I. Het Congres:
overtuigd, dat een nauwe samenwerking van de arbeidersbeweging in de verschillende landen nodig en wenselijk is om betere verhoudingen te bewerkstelligen tussen de volkeren onderling alsmede voor het tot stand komen van die maatregelen, welke in het algemeen belang zijn en op internationaal terrein liggen;
van oordeel, dat te dien aanzien de arbeidersbeweging zich in het algemeen nog te weinig laat gelden;
constateert, dat een rechtstreeks contact met de organisaties van de meeste landen in en buiten Europa belemmerd wordt door de talenverscheidenheid en dat ook zij, die in deze leiding hebben te geven over een uiteraard beperkte dus ontoereikende talenkennis beschikken;
is van mening, dat aan deze chaotische toestand een einde kan worden gemaakt door de toepassing van Esperanto als internationale taal;
betreurt het ten zeerste, dat de arbeidersorganisaties in stede van op dit terrein pionierswerk te verrichten, dat van buitengewoon belang kan zijn voor hun arbeid op internationaal terrein en bevorderlijk voor het vreedzame contact hunner leden individueel met burgers uit alle delen der wereld, zij tot nu toe steeds afwijzend bleven staan tegenover de invoering van Esperanto en hun steun onthielden aan de propaganda voor Esperanto;
dringt er, op grond van eigen ervaring gedurende enkele tientallen van jaren, op aan, thans maatregelen te nemen, opdat binnen de kortst mogelijke tijd het Esperanto de voornaamste plaats inneme in het internationale verkeer der arbeidersbeweging;
verzoekt ten spoedigste een commissie te benoemen om in deze van advies te dienen en reeds thans de Bond van Arbeiders Esperantisten moreel en materieel volledig te steunen.



II. Het Congres:
overwegende, dat de ontwikkeling op economisch, cultureel en politiek gebied internationale samenwerking en coördonatie dwingend voorschrijft;
van mening, dat de talenverscheidenheid een ernstige belemmering vormt voor een gezonde ontwikkeling van de internationale betrekkingen, en het gebruik van nationale talen geen enkele mogelijkheid biedt het talenprobleem tot een bevredigende oplossing te brengen;
overwegende, dat „Esperanto" als neutrale internationale taal in de practijk ten volle haar deugdelijkheid en bruikbaarheid heeft bewezen, het nationale prestige en de nationale waardigheid niet in het geding brengt, en de structuur van deze taal haar toegankelijk en aanvaardbaar maakt voor alle nationaliteiten;
overwegende bovendien, dat een groeiend aantal staten en internationale lichamen, gezien de behoefte aan een internationale taal en de bruikbaarheid van Esperanto voor deze functie, bereid zijn deze taal in hun internationale betrekkingen in te voeren;
dringt er bij de regering en alle betrokken instanties op aan:
1e. het onderwijs van Esperanto op de kweekscholen voor onderwijzend personeel in overweging te nemen en het onderwijs van Esperanto in de hoogste klassen van de lagere school mogelijk te maken;
2e. de mogelijkheid te onderzoeken van een internationale conventie betreffende de aanvaarding en het gebruik van Esperanto.



MEDEDELINGEN BONDSBESTUUR

Kvaronjaraj membrolistoj.
Ni petas la sekciajn sekretariojn, kiuj ankoraŭ ne sendis la kvaronjaran membroliston al sia Distrikto, senprokraste fari tion.
Por eviti plendojn pri nericevo de L.E., ni atentigas la samajn funkciulojn estontece ĝustatempe ensendi ĝin.

Ŝanĝiĝoj
Sekcio Arnhem: sekretario P. Rosseel, Sleedoornlaan 31, Arnhem.
Sekcio Assendelft: sekretario G. van 't Veer, Dorpsstraat 154, Assendelft.

Radio.
Op 3 Mei a.s. van 16.10—16.25 optreden van het Verda Kabaredo, onder leiding van Jos de Bruyn, verdere medewerkers zijn: Willy Bood en Ger Oosterbaan.
Op 7 Juni spreekt J. Hippe, lid v. h. hoofdbestuur v. d. Bond in de Grafische Vakken over: Esperanto in dienst van de Arbeidersbeweging.

Gazetarservo.
Alle correspondentie betreffende onze persdienst te richten aan: F.L.E., Roelantstr. 4, A'dam-W., dus n i e t aan k-do Slotegraaf.

1 Majo-flugfolio
Ni informis ĉiujn sekciojn pri la ebleco mendi flugfoliojn. Ni fiksis provizoran prezon de f 5.— por 1.000 ekz.
Se envenos sufiĉe da mendoj, tiam la prezo estos proks. f 4.—.

ATENTINDA JUBILEO.

La unuan de majo sekcio Amsterdam II festos sian 20-jaran jubileon. Pro du kialoj ĉi tiu fondiĝo evidentiĝis grava por la evoluo de nia organizo: ĝi estis la unua paŝo al la dispartigo de nia movado en Amsterdam, tiom necesa pro la pligrandiĝo de la urbo. La longa distanco al la unusola kunvenejo estis por multaj anoj grava ĝeno, kiu bremsis la aktivecon kaj prosperon de nia movado. La fondiĝo de „Ni volas lumen", montriĝis tiom sukcesa, ke baldaŭ estiĝis sekcioj ankaŭ en aliaj kvartaloj. En 1938 ni nombris en Amsterdam 831 anojn, kiun nombron ni neniam estus atingintaj per nur unu urba sekcio.
Hago kaj Roterdamo imitis la ekzemplon kun same rimarkinda rezultato. „Ni volas Lumen" montris al ni la vojon!
Due la fondiĝo de ĉi tiu sekcio donis al nia organizo — tiutempe suferanta anemion — novan sangon. Eniris la federacian estraron ĝiaj membroj k-doj H. W. Alings, Bersma kaj Blok. La unua kiel sekretario, la dua kiel kasisto, la tria kiel asesoro. K-do Alings fariĝis poste redaktoro de „Laborista Esperantisto", kiun funkcion li nun denove okupas.
La aktiveco de la nova sekcio estis instiga por nia tuta organizo, tiel, ke mi kuraĝas diri, ke kun „Ni volas lumen" ĝi komencis novan epokon, epokon de prospero. Pro tio al sekcio Amsterdam II nian koran gratulon okaze de ĝia 20-jara jubileo!

F. Faulhaber.

Jubileoj

En la kongreso troviĝis la gekdoj Woud el Wormerveer, kiuj aliĝis al F.L.E. antaŭ 35 jaroj.
En nia mezo troviĝas ankoraŭ kelkaj, kiuj servis nian asocion dum tiom da jaroj nome: La k-doj F. Faulhaber kaj B.A. Dreesman. K-do C. Delsen estas 35 jarojn esperantisto. Antaŭ 25 jaroj aliĝis nian organizon, k-do A. H. v. d. Horst. El nia membrokartoteko ni konstatis, ke en 1945 kaj 1946 niaj ankoraŭ ĉiam aktivaj anoj, N. Grijsen kaj E. Zachte estis dum 25 jaroj F.L.E. ano. Ĉiuj nomitaj loĝas en Amsterdam. Eble estas pluraj jubilantoj, kiuj same rajtas esti menciitaj pro sia nelaciĝebla persistemo. *Gratulon* Estraro F.L.E.

PERDITA
En la kongresejo aŭ en la proksimeco de tiu ejo *mi perdis fontoplumon* kaj *fontokrajonon.* Mi urĝe petas la trovinton sendi la ilojn al mia adreso, ĉar la neposedo de tiuj skribiloj signifas por mi grava malfacilaĵo.
Anticipe mian koran dankon.
A. M. D. Korff, Bestevaerstraat 123 hs., Amsterdam-West.
(Vidu ankaŭ paĝon 40, sube.)

RADIO.

WienI, Merkredo 06.35—06.45 Met, 506,8 m. Esperanto Kurso.
Wien II, Jaudo 17.50—17.55 Met, 31 m., 41 m. kaj 228,6 m.: Informservo.
Nepre sendu leterojn pri la sendaĵoj al Ravag -Wien 30a, Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.
„Pola Radio" Varsovio III, ondlongo 49,06 m., *ĉiun merkredon* 21.10 horo laŭ Gr. tempo, Esperanto prelegojn kaj informojn pri Pollando.
Skribu al „Pola Radio" Warszawa, Koszykowa 8.

ESPERANTO, DE TAAL DER WETENSCHAP.

Een brochure, uitgegeven door het Bureau voor Toepassing van Esperanto in de Wetenschap in Nederland.
De inleiding memoreert de uitspraak van **Leo Tolstoi:**
„Het offer, dat ieder lid van ons Europese werelddeel brengt, door enige tijd aan de studie van het Esperanto te besteden, is zo gering, en de resultaten, die daarmee kunnen worden verkregen, zijn zo groot, dat men niet mag nalaten, deze proef te nemen."
Volgt een warm pleidooi, om het Esperanto, als de meest logische taal, die voor ieder te leren is, in de Wetenschap toe te passen.
Een uitstekende brochure om bij wetenschappelijk aangelegde personen de aandacht op Esperanto te vestigen, het zo spoedig mogelijk te leren, het in de praktijk toe te passen en medewerking te verlenen bij de verbreiding.
De prijs is 10 cent. Verkrijgbaar bij Libro Servo, Roelantstraat 4, Amsterdam-West.

F.L.E. AMIKARO.
En aprilo ni sciigis, ke ano en Amsterdam varbis pli ol 80 F.L.E. amikojn. Rotterdam II havas membron kiu superis lin. Li sukcesis enskribi pli ol 250! Kiuj sekvas?

ESPERANTO NOMTABULO.

Estis iam en Arnhemo konata konstruaĵo en la internacia Esperanto-movado, pro la Internaciaj Csehkursoj, nome „Presikhaaf" alie dirite „La Esperantodomo". Bedaŭrinde la konstruaĵo perdiĝis por la Esperanto-movado, ĉar la komunumestraro stariĝos en ĝi mezgradan teĥnikan lernejon.
Tamen restis la aleo, kiu kondukas la vizitantojn de la „Velperweg" al la konstruaĵo, nomita „*Esperantolaan*".
Kaŭze de militaj atakoj la nomtabulo ege difektiĝis. Pro tio la Arnhema Esperantokunlaborkomitato, konsistanta el reprezentantoj de la Esperantogrupoj en Arnhem, planis projekton de nova, pli bonaspekta nomtabulo, por altiri la atenton de la preterpasantoj, pri Esperanto kaj por rememorigi la iaman Esperantosferon.
Estas la intenco inaŭguri ĉi tiun tabulon okaze de la 60-jara ekzisto de Esperanto en la mondo, dum la monato Julio 1947a.
Sed.... la tabulo kostas monon.
Ni pro tio petas al geinteresiĝintoj, sendi al ni etan sumon por subteni nian agadon. Vi povas sendi tion ĉiumaniere, menciante „Por la nomtabulo" al: P. Rosseel, Sleedoornlaan 31, Arnhem.

SOMERAJ KURSOJ EN DANLANDO.

Fidelaj al niaj tradicioj ni okaziĝos ankaŭ ĉi-jare somerajn Esp-kursojn.
De 17 ĝis 24 julio ili okazos en la internacia altlernejo en Helsingö, de 27-7 ĝis 2-8 en la altlernejo de Hadsten, tuj apud Aarhus, kie la SAT-kongreso estos de 2-8 ĝis 7-8. En la pasinta somero partoprenis preskaŭ 200 personoj el 8 landoj, kaj ni rajtas kredi, ke ĉi-jare venos kursanoj el pli da landoj. La manĝaĵo estas bonega kaj abunda en nia lando — kaj la humoro de la danaj Eistoj estas brila. Tial ni kore invitas vin. Petu prospekton pri la kursoj ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

REDAKCIOJ.
Interŝanĝekzemplerojn de via gazeto sendu al nia redakcia adreso, Middenweg 226, Amsterdam-O.

 EL LA DISTRIKTOJ

DISTRIKTO GRONINGEN/DRENTE.
Sekr.: H. Rijpstra, Gratamastraat 63 B, Groningen.
La semajnfino okazos la **31an de Majo kaj la 1an de Junio** en naturamikdomo „De Hondsrug" Noordlaren. Kunvokilojn ni sendis al ĉiuj sekcioj en la tri nordaj provincoj. Ĉiu ano do povas scii pri ĝi.
La **fermdaton** de la aliĝo ni fiksis je la **15a de Majo.** Kiom eble plej baldaŭ anoncu vin, ĉar ni povas gastigi nur 60 personojn. En ĉiu sekcio la anoj havigu la anoncilon al la sekretario, kiu almenaŭ antaŭ la 15a de Majo sendu ilin kolektive al la distrikta sekretariejo. Ĝeneralaj membroj povas fari tion rekte. Atentu: kasisto estas k-do R. van Kempen, Okiemuldersweg 166, Groningen.
H.R.

 EL LA SEKCIOJ

AMERSFOORT.
Nia estraro kunvenis kun la estraro de L.E.E.N. por priparoli la kunlaboradon de la lokaj esperanto-grupoj, speciale ĉe gravaj okazintajoj, komuna propagandvespero k.t.p. La rezulto estas, ke ni starigis propagando-komisionon. Kiel anoj de la komisiono elektiĝis:
De L.E.E.N.: Sinjorinoj Staal kaj Döbken.
De F.L.E.: la k-doj A. v. d. Kraats kaj J. Jonkman.
Nia propagando-komisiono (de L.E.E.N. kaj F.L.E.) sukcesis presigi semajne Esp. novajojn en la gazetoj. „Dagblad voor Amersfoort", „Het Parool". Ankaŭ la redaktoro de „Amersfoortse Courant" akceptas Esp. novajojn kiam estas spaco.
P. Poor-Procee.

AMSTERDAM II „Ni Volas Lumen".
La festkomitato starigita okaze de la 20-jara ekzistado de „Ni Volas Lumen" sciigas, ke la 17an de majo, ĝi aranĝos festvesperon en la konstruajo „Meerhuis", Brink 1, Tuindorp Watergraafsmeer, je la 20a horo. La programo fariĝos tre alloga kaj i.a. „la Verda Kabareto" kaj „La Verdaj Steloj" ĝin prizorgos.
Jam nun mendu enirbiletojn ĉe la supre nomita komitato, kies adreso estas: D. de Vries, Ploegstraat 123, Amsterdam (Oost).

APELDOORN. **Sekr.: Bloemheuvellaan 46.**
La 29an de marto nia grupo kunvenis. K-do Bakker, kiu estas malhelpata pro laboro, estas kiel prezidanto anstataŭata de k-do J. Kerssen.
Nia bibliotekisto posedas denove librojn k.c. Ĉe k-do Bredenoord, Bartelsweg 59, oni povas prunti ilin.
Ankoraŭfoje ni atentigas niajn anojn, ke la konversaci-vesperoj okazas ĉiun merkredvesperon je la 8a ĉe k-dino Woestenenk, Herderweg 1. Tiuj vesperoj estas tre interesaj kaj lernigaj.

DEVENTER. **Sekr.: van Mauwijkstraat 6.**
La 9an de aprilo okazis kunveno kie la delegitoj detale raportis pri la kongreso. Muzikgrupeto el niaj anoj, aŭdigis kelkajn muzikajojn. Estas la intenco regule agrabligi la konversaciajn vesperojn per muziko kaj kantado. Niaj muzikemaj membroj anoncu sin ĉe la estraro por pligrandigi la muzikgrupeton kaj por fondi kanthoron. H. Timmer.

HENGELO (O).
Sekr.: Wilderinksplein 13.
La 29an de Marto okazis propaganda kunveno en kunlaboro de J.G.O.B. kaj la infanklubo „Jong Leven". La prepar-komitato, formita el la tri kunlaborantaj organizoj, aranĝis festan programon.
Je la oka nia k-do E. Fuldauer, prez. de la komitato, bonvenigis la ĉ. 125 ĉeestintojn, inter kiuj gek.doj el Enschede kaj esperantistoj de aliaj asocioj. K-do E. Huisman el Enschede, paroladis pri la temo „Esperanto kaj la laborista junularo".
La parolinto trafe klarigis la gravajn mankojn de la nacia pedagogio, semanta nur malestimon kaj malamon kontraŭ aliaj popoloj kaj rasoj.
Plue menciinde estas la teatrajeto „Parolantaj pupoj", prezentita de la infanklubo. La „pupoj" diverslandaj flue kantis kelkajn esperanto-kantojn. La publiko entuziasme aplaŭdis la laŭdindan prezentadon kaj la muzikon de la juna akordion-muzikantino. La kvar lokaj gazetoj sufiĉe detale raportis pri nia propaganda kunveno. H. Julsing.

ZAANDAM — Antaŭen.
Sekr.: Emmastraat 28.
La konversacia vespero en kiu prelegis nia k-do de Bruin el Amsterdamo pri statistiko estis ne tiom bone vizitita. La ĉeestintaj gekdoj tamen havis lernigan vesperon. K-do de Bruin scias la arton por fari de „seka" temo, interesan prelegon. Ni kore diris al li „ĝis revido" en Septembro kune kun viaj geaktoranoj.
Interesaj rondetoj formiĝis, por aŭskulti ĉe iuj k-doj radio-elsendon esperantan el eksterlando. Post la elsendoj sekvas pritraktado de la elsendo. Tiel ni vere praktike uzas nian lingvon. Aliĝu al unu el tiuj grupetoj. Informiĝu ĉe la estraro.
Ĉar la vesperoj nun ĉiam pli agrabliĝas, ni intencas aranĝi malgrandajn promenadojn en nia urbo, dum kiu ni nur parolos esperanton. La adresoj ĉe kiuj oni povas sin anonci estas Rosmolenstraat 44 kaj Burg. ter Laanplantsoen 3.
Ni daŭrigos niajn konversaciajn vesperojn ankaŭ dum la somero. Atentu: **je la 7a k. 21a de Majo.** Konversaciejo Oostzijde 59. **Multaj ĉeestu.** Ni pritaktos i. a. la diversajn aranĝojn rilate al nia Esperanto-Semajno.
Ni ricevis de sekcio Koog-Zaandijk, inviton por la festkunveno kaŭze de ĝia 15 jara ekzistado, kiu okazos Sabatvesperon la **3an de Majo** en „Ons Aller Belang" **Oostzijde Zaandam.** Multaj gezaandamanoj akompanu nin! La estraro.

LIBRO-SERVO F.L.E.
Roelantstraat 4, Amsterdam-W.,
Postgiro 111278.

Op elke envelop, op elke briefkaart plakt men dit jaar, *aan de adreszijde*, een zegel:
„Esperanto 60-jara" 100 stuks f 0.75; of een Esp. sterretje 100 stuks f 0.25.
Wij hebben ook:
Enveloppes bedrukt met „Esperanto" 100 stuks f 1.80;
Schrijfpapier, klein formaat 100 vel f 1.80.
Is het voor u te veel, koop dan een kwantum gezamenlijk.

KVIN LIBROJ POR f 1.50!!!
Neĝulino kaj aliaj fabeloj, de fratoj Grimm trad. de Kabe, (ilustrita);
Historio de Esperanto, de K. Brüggemann;
La almozulino de la „Pont des Arts", de Wilhelm Hauff;
El la mitologio de antikvaj popoloj, de K. Brüggemann;
Aventuro en la novjara nokto, de H. Zschokke.
Mendu tuj!

JU-KO.
Sekr.: P. Bakker, Langereis A 31, Hoogwoud.
Ne ĉiuj junaj anoj de F.L.E. ankoraŭ anoncis sin al Juko.
Kial ne? Kial ne ĉiuj jam kunlaboras en la kadro de Juko por dum ties renkontiĝaj enpenetri la neesperantistan Junularon el kiu ni ĉerpu novajn adeptojn por nia lingvo. Ne prokrastu, sed anoncu vin al la sekr.

Ŝparkaso.
Por faciligi la partoprenon al niaj renkontiĝoj ni havas ŝpar-kason (**Rijkspost spaarbank**). Ŝparkartojn kaj ŝparmarkojn de f 0.25 estas akireblaj ĉe la kasistino, k-dino Tini Wey, Julianalaan 18, Bergen aan Zee, kaj ĉe via peranto.

Tutlanda junularrenkontiĝo.
Dum la pentokostotagoj Ju-Ko organizos tutlandan renkontiĝon en Putten.
Por interesigi la renkontiĝon, ni ne tranoktos en junulargastejo, sed en tendoj.
La kostoj estos kiom eble plej malaltaj. Detalajn informojn vi ricevos pere de speciala buteno. Tamen ni nepre konsilas al vi jam nun anoncu vin, por ke ni havu superrigardon pri la nombro da partoprenontoj.

RECENSIE.
Van Vreemde Velden. 2 delen. Jac. Feitsma. Uitg.: Born's Uitgeversbedrijf N.V., Assen. *f* 2.50 per deel.
De grote massa blijft nog van veel literair genot verstoken, omdat zij niet in staat is de kunstwerken te lezen in de taal, waarin zij geschreven zijn. Vooral als de taal een minder bekende is, dreigen de werken onbekend te blijven. Daarom was het een goede gedachte om ook van vrijwel onbekende buitenlandse literatuur een bloemlezing samen te stellen.
De twee deeltjes, die via Esperanto, in het Nederlands vertaald werden, brengen ons nader tot de literatuur van Estland, Letland, Lithauen, Hongarije en Bulgarije.
Jammer is het, dat door de dubbele vertaling, wel wat van het oorspronkelijke verloren gaat. De indrukken bij het lezen van de verschillende novellen zijn niet altijd even diep. De lezer wordt niet voor problemen geplaatst, wellicht ook, doordat de schetsen in het algemeen vrij kort zijn.
De best geslaagde lijken ons wel: De versplinterde galjas, De jonge duif en De gebochelde.
De boekjes zijn vlot geschreven en goed verzorgd. Deze gezonde lectuur, die tevens aantoont wat met Esperanto te bereiken is, zal zeker haar weg wel vinden.
J. van Scheepen.

 ANONCOJ

WILLY HOHNSTÄDTER, Berlin N 54, Zionskirchstr. 9, v. III lks, serĉas korespondantojn.
KVAR ANGLAJ INFANOJ ĉ. jaraj, deziras korespondi kun samaĝaj Nederlandanoj. Ili interesiĝas pri moroj, kutimoj, havenoj, polderoj, k.c. sed komence ŝatas mallongajn leterojn kaj bildkartojn.
Iliaj nomoj estas:
Doreen Lock, Ida Harvey, William Pugh, kaj Donald Roberts.
Bonvolu adresi al: S-ro R. S. HOLLIER, 30 Woodstock Road, Forest Gate E 7, Londono, Anglujo.
KONGRESANOJ.
Dimanĉon la 6an de aprilo, fraŭlino kiu veturis per speciala aŭtobuso de Valkenburg al Treebeek, *perdis* sian *dekstran grizebrunan glacean ganton* (beige glacé).
La trovinto bonvolu sendi ĝin al: J. Nijboer, Oud-Valkenburgerweg 2b, Valkenburg.